"Akademiano N. J. Marr esprimas sin en favoro de unu sola komuna lingvo por la estonta homaro. Tio estas la sola principo, pri kiu la opinioj de Akademiano N. J. Marr ŝajnas akordi kun la tezoj de la Marksismo-Leninismo."

Profesoro Arnold Stepanoviĉ Ĉikobava, en la ĵurnalo Pravda, Moskvo, 9-an de Majo, 1950.

La kvin verkistoj, kies nomoj aperas en la subtitolo de ĉi tiu artikolo – tri gruzoj (georgoj) kaj du Esperantistoj – ne estas samopiniaj, same gravaj aŭ same interesaj. Tamen en diversaj manieroj ili ĉiuj reprezentas tion, kion Profesoro Ĉikobava nomas unu el "la tezoj de la Marksismo-Leninismo": la opinion, ke la naciaj lingvoj malaperos favore al unu komuna lingvo por la tuta homaro aŭ – por uzi la vortojn de D-ro Ivo Lapenna – ke, "ĉar en larĝaj, grandaj linioj la homaro iras de la iama ĉiaspeca disrompiteco (hordoj, triboj, gentoj, popoloj, nacioj, unuflanke; okupoj, kastoĵ, klasoj, aliflanke) al unueco, la lingvo ankaŭ evoluas de la iama tre granda multlingveco al baldaŭa unulingveco."

Tiu "tezo de Marksismo-Leninismo" nepre kontraŭas la ideon de Zamenhof (kiun Drezen pro tio kaj pro aliaj kaŭzoj nomis "etburĝa pacifisto"), ke Esperanto ne devas anstataŭi la naciajn lingvojn, sed ke, "ne entrudiĝante en la doman vivon de la popoloj", ĝi servos kiel lingvo neŭtrala kaj internacia. La tezo ankaŭ kontraŭas la tradicion de la Esperanto-movado, kies pioniroj ĉiam insistis, ke Esperanto neniel kontraŭas la naciajn lingvojn, kaj la Deklaracion de Boulogne-sur-Mer, kiu diras, ke la Esperantistoj klopodas disvastigi "la uzadon de lingvo neŭtrale homa... ne entrudante sin en la internan vivon de la popoloj kaj neniom celante elpuŝi la ekzistantajn lingvojn naciajn."

La marksista-leninista-lapenista hipotezo, ke la evoluo iras "de multlingveco al unulingveco", estas malakceptata de preskaŭ ĉiuj seriozaj lingvistoj. Neniu pruvo ekzistas por ĝi, kaj ĝia uzo en la propagando de Esperanto povas havi nur malfavorajn konsekvencojn.

En la pasinta jaro, post la apero de mia recenzo pri *La Internacia Lingvo* de D-ro Ivo Lapenna, multaj personoj demandis, kion mi pensas pri la verko *Retoriko* de la sama aŭtoro. Mi respondis, ke mi nur rapide trarigardis ĝin kaj ke mi havis la impreson, ke la dua parto (Retoriko) estas bona, sed ke la unua parto (La Lingvo) estas senvalora. Poste mi pli zorge tralegis la libron. Mia reviziita opinio estas, ke la dua parto estas ne nur bona, sed bonega kaj treege interesa (ĉar la aŭtoro pritraktas temon, kiun li komprenas kaj pri kiu li estas tre sperta), sed ke la unua parto estas ne nur senvalora, sed tute fuŝa kaj absurda kaj parte eĉ danĝera.

Mi longe hezitis, ĉu mi devus nun verki recenzon pri la libro aperinta en 1950. Ĝi ne estis eldonita de Universala Esperanto-Asocio, kiel *La Internacia Lingvo*, sed estas privata eldonaĵo de la aŭtoro. Aliflanke ekzistas la fakto, ke D-ro Lapenna nun estas Ĝenerala Sekretario de UEA

kaj ke multaj Esperantistoj opinias, ke tiaj publikigaĵoj eldonitaj de li havas "sciencan" valoron. Eĉ pli grava estas la fakto, ke la ideoj de la Unua Parto de *Retoriko* ŝajne servis kiel bazo por la treege kritikinda *Nefermita Letero al J. V. Stalin*, publikigita en Majo 1952 de la Estraro de UEA kaj de la Plenumkomitato de SAT.

Laŭ la gazeto *Voprosi Jazikoznaniĵa* (Problemoj de la Lingvoscienco), eldonata de la Soveta Akademio de Sciencoj, oni nun eĉ en Moskvo definitive forĵetis la fantaziajn lingvosciencajn tezojn de Stalin, samtempe kondamnante denove la absurdajn teoriojn de Marr, kiujn Lapenna reklamas en *Retoriko*. Eble nun estas tempo por fari klopodon, enkonduki iom da klareco en la konfuzon, kaj por kontraŭmeti al la ĉarlatana "marksista-leninista" lingvoscienco kelkajn bazajn faktojn kaj principojn, almenaŭ tie, kie temas pri problemoj, kiuj rilatas al Esperanto.

Bedaŭrinde ne estas eble, fari tion kontentige en unu artikoleto. Mi do devas verki plurajn artikolojn pri la temo. Tio donos al mi okazon, klarigi kelkajn fundamentajn aspektojn de la lingva problemoj kaj de Esperanto; eble tio estos pli interesa por la legantoj, ol se mi verkus nur recenzon pri unu aŭ du libroj. Mi klopodos fari la klarigojn laŭeble facile kompreneblaj. Sed sendube mi ne ĉiam sukcesos, ĉar kelkaj detaloj estas komplikitaj.

Dramatis Personae

Jen unue kelkaj faktoj pri la "personoj en la dramo":

Marr, Nikolaj Jakovlevič, gruzo (georga) lingvisto, 1864-1934, naskita en Kutaisi (Gruzujo) de skota patro kaj gruzaj patrino, esploris la kaŭkazajn lingvojn, fariĝis Profesoro en la Peterburga Universitato en 1900, Membro de la Rusa Imperiestra Akademio de Sciencoj jam sub la cara reĝimo, referaris sian sciencan post la Komunista Revolucio sur la bazo de la Marksismo-Leninismo, nomante ĝin "la nova instruo pri la lingvo" aŭ "la Jafetida Teorio", fariĝis ĉefa reprezentanto kaj diktatoro de la lingvoscienco en la Soveta Unuiĝo, estis forte atakata kaj kondamnata 16 jarojn post sia morto de du aliaj gruzoj: Ĉikobava kaj Stalin. En 1951 la Soveta Akademio de Sciencoj fondis la revuon *Voprosi Jazikoznaniĵa* por "likvidi la konsekvencojn de la regado de la kontraŭsciencaj opinioj de Marr kaj liaj anoj". En Esperanto disvastigis la ĉarlatanaĵojn de Marr verketo de Andrej Petroviĉ Andreev, "Revolucio en la Lingvoscienco", aperinta en 1931, diversaj artikoloj en la organoj de SAT (Senacieca Asocio Tutmonda) kaj IPE (Internacio de Proletaj Esperantistoj), kaj la unua parto de la libro *Retoriko* de Ivo Lapenna.

Drezen, Ernest Karloviĉ, soveta (latva) Esperantisto, naskita en Liepaja (Latvujo) en 1892 aŭ 1900 (laŭ diversaj fontoj), mortis je nekonnata dato: "arestita de la Beria-banditoj – kiel oni diris – mortis en malliberejo" (Erik Ekström en *Svenska Esperanto-Tidningen* de Novembro 1956). Esperantisto de 1910, li post 1917 okupis postenojn en la Ruĝa Armeo, la Centra Ekzekutiva Komitato de la Sovetoj, la Soveta Societo por Rilatoj kun la Eksterlando (VOKS), kaj la Soveta Normiga Komitato, estis unu el la fondintoj de la Esperanto-Sekcio de la Komunista Internacio (ESKI) en 1919, fariĝis Prezidanto de la Centra Komitato de la Sovetlanda Esperantista Unuiĝo (SEU) en 1921, verkis librojn en kaj pri Esperanto inter ili *Za Vseobščim Jazikom – Tri Veka Iskanij* (Al Universala Lingvo – Tri Jarcentoj da Serĉado), kun antaŭparolo de Marr kaj

kun teoria enkonduko sub la titolo "Provo de Materialista Fundamentigo de la Problemo"; aŭtoro de la broŝuro, "Pri la Problemo de la Internaciigo de la Science-Teknika Terminaro". Drezen dum jaroj serĉadis la subtenon de Marr por Esperanto, sed poste proksimiĝis al kritikantoj de Marr en la tielnomata *Jazikfront*. Drezen verkis artikolojn pri Esperanto kaj Zamenhof en la unua eldono de la Granda Soveta Enciklopedio.

Stalin, Iosip Visarionoviĉ Džugaŝvili, 1879-1953, gruza (georga) komunisto, post la morto de Lenin (en 1924) diktatoro de la Soveta Unuiĝo kaj de la internacia komunismo, studis Esperanton en malliberejo en Baku, en 1909, parolis pri lingvaj problemoj en "Marksismo kaj la Nacia Problemo" (1913), en parolado al la membroj de la Komunista Universitato de Orientaj Laboristoj, en "Parolado al la Burjataj Kamaradoj", en "La Nacia Problemo kaj la Leninismo" (1929), en parolado al la 16-a Kongreso de la Komunista Partio (VKP/b) en 1930, fine en "La Marksismo kaj la Problemoj de la Lingvoscienco" (1950). Dum multaj jaroj Stalin subtenis la lingvosciencan diktatorecon de Marr; en kaj post 1950 li same forte atakis lin. Estas dube, ĉu Stalin mem verkis iun el la lingvosciencaj partoj de siaj verkoj. Laŭ Trocki, la vera aŭtoro de "La Marksismo kaj la Nacia Problemo" estis Lenin. Kelkaj fakuloj opinias, ke la lingvosciencaj partoj de la parolado al la 16-a Komunista Partikongreso estis verkitaj, almenaŭ parte, de Marr. Estas preskaŭ certe, ke Ĉikobava estas la ĉefa aŭtoro de "La Marksismo kaj la Problemoj de la Lingvoscienco".

Ĉikobava, Arnold Stepanoviĉ, gruza lingvisto naskita en 1898, Profesoro de la Lingvoscienco en la Gruza Akademio de Sciencoj en Tbilisi (Tiflis), aŭtoro de Vortaro de la Gruza Lingvo kaj de verkoj pri la mingrela kaj la laza lingvoj. Li malfermis la atakon kontraŭ Marr kaj liaj ideoj en *Pravda* la 9-an de Majo 1950, verkis unu el la ĉefaj artikoloj kontraŭ Marr en la duvoluma verko "Kontraŭ la Vulgarigo kaj Falsigo de la Marksismo en la Lingvoscienco", eldonita de la Soveta Akademio de Sciencoj en 1951 kaj 1952, estis verŝajne la ĉefa aŭtoro de la verko de Stalin, "La Marksismo kaj la Problemoj de la Lingvoscienco", verkis la oficialan lernolibron de la stalinista lingvoscienco por la sovetaj universitatoj kaj pedagogiaj institutoj, *Vvedenie v Jazikoznanie* (Enkonduko en la Lingvosciencon), estas unu el la redaktoroj de la revuo *Voprosi Jazikoznanija* (Problemoj de la Lingvoscienco).

Lapenna, Ivo, jugoslava (kroata) Esperantisto, naskita en 1909 en Split, estis Profesoro de Internacia Publika Juro kaj Internaciaj Rilatoj en la Universitato de Zagreb, nun loĝas en London, Britujo; Ĝenerala Sekretario de Universala Esperanto-Asocio (UEA) kaj Direktoro de ĝia Centro de Esploroj kaj Dokumentado, aŭtoro de *Retoriko* (1950), *La Internacia Lingvo* (1954), *Aktualaj Problemoj de la Nuntempa Internacia Vivo* (1952) kaj aliaj libroj, verkinto de la *Nefermita Letero al J.V. Stalin* publikigitan en 1952 de la Estraro de UEA kaj la Plenumkomitato de SAT.

Ĉu "Helpa" aŭ "Universala" Lingvo?

La *Voprosi Jazikoznanija* de Julio-Aŭgusto 1956 publikigis raporton de sia provizora redakta sekretario, V.P. Grigorjev, pri prelego farita de D-ro E.A. Bokarev en la Sekcio de Ĝenerala kaj Kompare-Historia Lingvoscienco de la Lingvosciencia Instituto de la Soveta Akademio de Sciencoj. La temo estis "La Nuna Stato de la Problemo de Internacia Helpa

Lingvo". Komplete angla traduko de la artikolo aperis en la Januara-Februara numero de Amerika Esperantisto.

Unu el la karakterizaj faktoj pri la artikolo estas, ke ĝi parolas ĉiam pri internacia *helpa* lingvo (*mejdunarodnij vspomogatelnij jazik*). Tiu adjektivo "helpa" aperas ne malpli ol sesfoje en la raporto. Tiel la aŭtoro evitas la danĝeron, intermiksi la problemon de *internacia helpa lingvo*, kiu estas utila nun kaj povos fariĝi eĉ pli utila en la proksima estonteco, kun la problemo de "universala" lingvo, kiu iam – post centoj, miloj aŭ dekmiloj da jaroj – laŭ la tezoj de la Marksismo-Leninismo, laŭ Engels, Lenin, Stalin, Marr, Drezen, Ĉikobava kaj aliaj, regos mondon, en kiu la naciaj lingvoj estos "formortintaj". Kvankam la prelego de D-ro Bokarev enhavas mension de "la marksista-leninista koncepto" kaj ankaŭ mension de la uzo de Esperanto "en la movado de la pacbatalantoj" (laŭ la stilo de Moskvo), Bokarev ĝenerale uzas la klasikajn argumentojn de la tradicia Esperanto-propagando. Lia prelego estas rimarkinde libera de la utopiaj kaj nesciencaj ideoj de Drezen, Lanti kaj Lapenna.

Eble mi ne devus mencii la nomon de Lapenna apud la nomoj de Lanti kaj Drezen. Tiuj du almenaŭ klopodis prezenti iugrade logikan sistemon de ideoj pri la lingva problemo, dum la nuna Generala Sekretario de UEA fabrikas nedigesteblan miksititan salaton el la plej malharmoniaj ingrediencoj. Se oni verŝas, kiel li, la opiniojn de Meillet kaj tiujn de Marr en la saman botelon, oni ne miru, ke la miksaĵo eksplodas.

"De Multlingveco al Unulingveco"

La fakto, ke Lapenna radikale forjetas la Zamenhofan ideon de internacia lingvo, kiu neniel kontraŭas la naciajn lingvojn, jam fariĝas evidenta en la *Antaŭparolo al Retoriko*. Sur la dua paĝo Reto Rossetti skribas: *"Kelkiuj pretendas, ke la diversaj naciaj lingvoj kunfandiĝos per natura historia procezo kaj tiel formos el si la unikan tuthoman lingvon de la estonto. D-ro Lapenna montras, ke iusence tiuj personoj pravas... Por ke la lingvoj kunfandiĝu, necesas komuna struktura bazo. Tiu bazo estas Esperanto, la Internacia Lingvo. Ĝi estas la ujo, kiu ricevas la komunajn vortojn kaj la komunan kulturon, kaj sekve ĝi estas la bazo, sur kiu kreskas la granda komuna lingvo de la homaro."*

Jen vortoj de Drezen el *Za Vseobŝim Jazikom* (p. 31): "Internacia helpa lingvo en la nunaj cirkonstancoj estas lingvo de transira periodo, dum kiu ruiniĝas kaj rompiĝas la malnova kapitalista mondo kaj la malnovaj kapitalistaj rilatoj, kiam la malnovo ankoraŭ ne tute formortis, kiam ankoraŭ konservas sian forton kaj sian gravecon la diversaj naciaj lingvoj, sed kiam samtempe estiĝas kaj konstruiĝas nova kulturo, nova ekonomia sistemo kaj nova universala lingvo, en la fina rezulto kondukante al la starigo de la socialismo kaj komunismo en ĉiuj landoj de la mondo." (Ne havante la Esperanto-tradukon de la verko de Drezen, mi citas laŭ la rusa originalo.)

Jen la ideoj de Lanti (*Manifesto de la Sennaciistoj*, p. 27): *"La sennaciistoj batalas kontraŭ ĉio nacieca: kontraŭ naciaj lingvoj kaj kulturoj, naciaj kutimoj kaj tradicioj. Por ili Esperanto estas ilia ĉefa lingvo kaj la naciajn lingvojn ili konsideras nur kiel helpajn. Ili rifuzas partopreni en iu nacibatalo kaj agnoskas kiel necesan kaj profitdonan nur la klasbatalon..."*

Komparu kun la fantaziaj ideoj de Lanti, Drezen kaj Lapenna – pri

“batalo kontraŭ la naciaj lingvoj”, “formortado de la naciaj lingvoj” kaj evoluo “de multlingveco al unulingveco” – la klarajn, modestajn kaj inteligentajn vortojn de Zamenhof, kiu en la Antaŭparolo al la “Unua Libro” – eldonita en 1887, antaŭ 70 jaroj – prezentis la argumenton, ke la uzo de internacia lingvo ne malhelpos, sed helpos la naciajn lingvojn: “Devigataj dividi nian tempon inter diversaj lingvoj, ni ne havas la eblon dece fordoni nin eĉ al unu el ili, kaj tial de unu flanko tre malofte iu el ni posedas perfekte eĉ sian patran lingvon, kaj de la dua flanko la lingvoj mem ne povas dece ellaboriĝi, kaj, parolante en nia patra lingvo, ni ofte estas devigataj aŭ preni vortojn kaj esprimojn de fremdaj popoloj, aŭ esprimi nin neprecize kaj eĉ pensi lame dank’ al la nesufiĉeco de la lingvo. Alia afero estas, se ĉiu el ni havus nur du lingvojn, – tiam ni pli bone ilin posedus, kaj tiuj ĉi lingvoj mem povus pli bone ellaboriĝadi kaj perfektigadi kaj starus multe pli alte, ol ĉiu el ili staras nun.” (*Originala Verkaro*, p. 18.)

La strangaj “sciencaj” argumentoj, per kiuj Lapenna atingas sian konkludon, ke la mondo iras “de multlingveco al unulingveco”, estos pritraktataj poste en mia artikolo.

La “Nefermita Letero al Stalin”

En Junio 1952 la gazeto *Esperanto* publikigis “nefermitan leteron al J.V. Stalin” subskribitan en “Londono-Parizo, Majo 1952” de la Estraro de UEA kaj la Plenumkomitato de SAT. D-ro Lapenna, kiu verkis tiun leteron, ŝajne opiniis, ke ĝi havigos al Esperanto multe da atento kaj ĝi estos utila por la propagando. Fakte tamen – neeviteble – preskaŭ neniu ekster la Esperanto-movado donis al ĝi seriozan atenton. Kiam la Esperanto-Asocio de Nord-Ameriko ricevis la tekston antaŭ ĝia publikigo, ni tuj vidis, ke ĝi ne estas uzebla aŭ uzinda pro ĝia ĝenerala tendenco kaj pro la gravaj eraroj, kiujn ĝi enhavas. Mi ĝis nun ne publike parolis pri la afero, sed klarigis mian opinion buŝe kaj skribe al diversaj personoj.

La *Nefermita Letero* pretendis esti Esperantista respondo al la rimarkoj de Stalin pri “la demando de internacia lingvo”. Fakte Stalin ne estis parolinta pri la problemo de internacia *helpa lingvo apud* la naciaj lingvoj, sed estis kritikinta la ideojn de Marr pri la uzo de “artefaritaj iloj” por plirapidigi la “kunfandiĝon de la ekzistantaj lingvoj en unu komunan lingvon.”

Stalin kaj Ĉikobava unuflanke kaj la anoj de Marr aliflanke tute konsentis pri tio, ke venos, laŭ Ĉikobava, “ unusola komuna lingvo de la venonta homaro”, ke okazas, laŭ Marr, “evoluo de la diversaj lingvoj en linio direkte al la estonta unu sola lingvo”, kaj ke, laŭ Stalin, “la naciaj diferencoj kaj lingvoj komencos formorti, cedante sian lokon al mondlingvo komuna al ĉiuj”.

La temo de la diskuto do tute ne estis la problemo de internacia *helpa lingvo* en la nuna epoko, sed nur kaj ekskluzive la problemo de estonta universala lingvo, kiu anstataŭos la naciajn lingvojn. Marr estis skribinta: “Por ni ... ne ekzistas dubo pri la evoluo de la diversaj lingvoj en la direkto al unu sola estonta lingvo nek pri la fakto, ke *la homaro*, irante al unueco de la ekonomio kaj de la senklasa socio, *ne povas ne uzi artefaritajn ilojn science ellaboritajn por plirapidigi tiun tutmondan evoluon*”.

→

Tiu uzo de "artefaritaj iloj" (*iskusstvennie meri*) por plirapidigi la "formortadon" (*otmiranie*) de la naciaj lingvoj kaj starigi universalan lingvon, al kiu ili devas "cedi sian lokon" (*ustupaťj mesto*), kaj la proksimeco aŭ malproksimeco de la tempo, kiam la naciaj lingvoj mortos, estis la solaj temoj de la mondlingva diskuto inter la anoj de la marksista-leninista teorio. Alivorte: *Tiu afero neniel koncernis la Esperantomovadon.*

Kial Enmiksi Esperanton en Tio?

Malgraŭ tio kompreneble la Estraro de UEA estus povinta, se ĝi trovis tion utila, uzi la okazon por diri ion pri la persekuto de la Esperantomovado en la Soveta Unuiĝo kaj pri la malamika sinteno de sovetaj aŭtoritatoj kaj publikigaĵoj al Esperanto. La unua nepre necesa kondiĉo por tia deklaro estus estinta la konstato, ke diskutoj pri "kunfandiĝo de la lingvoj", "formortado de la naciaj lingvoj" kaj "unu sola lingvo por la estonta homaro" ne koncernas la Esperantomovadon, ĉar *Esperanto estas internacia lingvo neniel ligata al tiaj teorioj kaj neniel celanta anstataŭi la naciajn lingvojn aŭ kontraŭbatali ilin.*

Tian deklaron sendube ne estus subskribinta la Plenumkomitato de SAT, ĉar ĝi konsistas el malnovaj amikoj de Lanti, kiu skribis, ke "la sennaciistoj batalas kontraŭ naciaj lingvoj". Tian deklaron eble ne povis subskribi Ivo Lapenna, kiu ĵus estis publikiginta en *Retoriko* siajn fantaziaĵojn pri evoluo "de la iama tre granda multlingveco al baldaŭa unulingveco". Sed kial la aliaj tiamaj Estraranoj de UEA – S-roj Malmgren, Kempeneers, Jakob, Kennedy kaj Oliver – ne insistis pri tia klarigo nepre necesa? Ĉu ili akceptis la marksistan-leninistan tezon pri universala lingvo anstataŭ la naciaj lingvoj? Tio ne estas verŝajna. Eble ili nur faris tion, kion ili faris en multaj aliaj kazoj: Ili blinde akceptis kaj subskribis tion, kion D-ro Lapenna prezentis al ili. Se la afero okazis tiel, tio eble absolvas ilin de kulpo, sed ne estas flata por ilia inteligenteco aŭ ilia kapableco, kompreni la esencon de la problemo.

La *Nefermita Letero* citas el unu el la leteroj de Stalin, kiuj trovigas en lia verko *La Marksismo kaj la Problemoj de la Lingvoscienco* (Mi iomete mallongigas la citaĵojn):

"Rilate la ... formulon de Stalin, ... kiu koncernas *la kunfandiĝon de la lingvoj en unu komunan lingvon*, ĉi tie estas pensate al alia epoko, nome el epoko post la venko de socialismo en mondaj kadroj... Ĉi tie temos ... pri centoj da naciaj lingvoj, el kiuj, rezulte de longa ekonomia, politika kaj kultura kunlaborado de la nacioj, unue elstaros la plej riĉigitaj unuecaj zonaj (regionaj) lingvoj, kaj poste *la zonaj lingvoj kunfandiĝos en unu komunan lingvon, kiu kompreneble estos nek la germana, nek la rusa, nek la angla, sed nova lingvo*, kiu estos kolektinta en si la plej bonajn elementojn de la naciaj kaj zonaj lingvoj."

Dufoje en tiu citaĵo Stalin parolas pri la "kunfandiĝo" de la lingvoj en unu komunan lingvon. Tamen la *Nefermita Letero* ŝajnigas, ke tio koncernas Esperanton: "Sed koncerne vian starpunkton al la Internacia Lingvo, ni konsideras kiel nian devon, doni al vi kompetentan, koncizan respondon, des pli, ke en la lastaj monatoj ni havis la okazon, konstati la negativan efikon de via letero por la plua disvastigo de Esperanto en kelkaj landoj."

Fuŝaj Ciferoj

La "kompetenta" respondo konsistas el kvar partoj. Ĉiu el tiuj partoj enhavas seriozajn erarojn (kompreneble kun kelkaj bonaj kaj ĝustaj argumentoj). Pri kelkaj el tiuj eraroj mi ankoraŭ parolos. Nun mi mencias nur unu fuŝan aserton, ĉar D-ro Lapenna remaĉas ĝin ĉiam denove. En *Retoriko* (p. 33) li skribis: "Se oni konsideras, ke eĉ en Anglujo, do en lando kun tre alte evoluintaj kulturo kaj civilizo, kelkloke la kamparano ne konis pli ol 300-400 vortojn ankoraŭ en la pasinta jarcento, oni ne multe eraros, se oni taksos tiun komunan vortprovizon al ĉirkaŭ 500 vortoj. La bone edukitaj, kleraj homoj uzas meze ĉ. 3000-4000 vortojn." En *La Internacia Lingvo* (p. 21) li uzis la samajn ciferojn, sed aldonis: "Nur grandaj pensuloj kaj verkistoj posedis meze 10 000 vortojn." La *Nefermita Letero al Stalin* diras: "Laŭ la lingvisto M. Müller ankoraŭ en la deknaŭa jarcento troviĝis vilaĝoj en Anglujo, en kiuj la kamparanoj ne sciis pli ol 400 vortojn. Meze kleraj homoj posedas kutime 4 000-5 000 vortojn." Tiuj ciferoj estas absolute idiotaj. La Estraranoj de UEA ne devus havi la rajton ridindigi la Esperanto-movadon per subskribado de tiaj fuŝaĵoj.

Ciferoj de Modernaj Lingvistoj

Mi citos du modernajn lingvistojn pri la temo. *Mario Pei* skribas: "Tre zorga studo farita de grupo da psikologoj prezentas jenajn ciferojn: Meza 4-jara infano scias pli ol 5 000 vortojn, 6-jarulo 14 000, 8-jarulo 26 000, 10-jarulo 34 000. Alia proksimuma kalkulo konkludas, ke dujara infano havas vorttrezoron de proksimume 300 vortoj, 6-jarulo inter 2 000 kaj 3 000, stulta plenkreskulo 10 000, mezklara plenkreskulo inter 35 000 kaj 70 000. La diferenco inter tiuj ciferoj povas esti parte eksplikata per konfuzo inter *uza* vorttrezoro kaj *komprena* vorttrezoro. Por ĉiu vorto, kiun ni konstante uzas en ĉiutaga parolado, ekzistas eble dek vortoj, kiujn ni komprenas, kiam ni aŭdas aŭ legas ilin. Kelkajn el tiuj vortoj ni eĉ kapablas uzi, kiam la okazo necesigas tion. Tio signifas, ke infano aŭ plenkreskulo havanta normalan uzan vorttrezoron de mil vortoj 'konas' 11 000 vortojn." (*The Story of Language*, p. 112.)

Jen la vortoj de eĉ pli eminenta lingvisto, *Leonard Bloomfield*: "Kiam ni aŭdas, ke Shakespeare uzas 20 000 malsamajn vortojn en siaj verkoj kaj ke estas 8 000 vortoj en la poemoj de Milton, ni erare konkludas, ke malpli elokventaj personoj uzas multe malpli da vortoj. Estas indiko de la genio de Shakespeare, ke li uzis tiom da vortoj en tiel malgranda kvanto da parolmaterialo, kiel troviĝas en liaj verkoj, sed tiu kvanto estas malgranda kompare al la kvanto, kiun eĉ silentema persono parolas en la daŭro de unu jaro. *La mitoj pri kamparanoj, laboristoj aŭ sovaĝuloj uzantaj nur kelkajn centojn da vortoj havas nenian bazon en la faktoj.* Tiom, kiom oni povas kalkuli vortojn (ignorante ekzemple la fleksiajn formojn de lingvo kiel nia), ĉiu plenkreskulo uzas minimume inter 20 000 kaj 30 000 vortoj. *Ĝe li estas klera, t.e. ĝe li scias teknikajn kaj sciencajn vortojn, li uzas multe pli grandan nombron. Atentu la plan fakton, ke ĉiu persono komprenas multe pli grandan nombron da vortoj ol li uzas.*" (*Language*, p. 277.)

(daŭrigota)

Ĉu vi jam renoviĝis vian membrecon en EANA por la jaro 1957?

GRAVA RELIGIA UZO DE ESPERANTO

Memorlibro de la Tria Esperantista Eŭkaristia Mondkunveno okazinta en la kadro de la XXXVI-a Internacia Eŭkaristia Kongreso. Kompilita de Pastro D-ro Johano B. Kao O.F.M., Rio de Janeiro, 1956. 215 paĝoj kaj 76 bildoj. Prezo \$2.15. Havebla de EANA.

JEN libro interesa, grava, impona por katolikoj kaj por personoj, kiuj volas propagandi por Esperanto en katolikaj organizoj, lernejoj aŭ universitatoj. La kompilinto estas bone konata al multaj el niaj legantoj kaj al multaj katolikaj eminentuloj en Usono, ĉar li loĝis proksimume ses jarojn en nia lando kaj multe helpis nian Esperanto-movadon. Pastro Kao, kiu ankoraŭ havas la titolon de Generala Vikario de katolika diocezo en Ĉinujo kaj kiu iam estris la Centran Oficejon de Katolikaj Lernejoj en Ĉinujo, studis en Romo, doktoriĝis en Francujo kaj vojaĝis ĉirkaŭ la tuta mondo. Li nun loĝas en Brazilo, kie li helpas ĉinajn rifuĝintojn kaj ankaŭ multe laboras por Esperanto.

La Eŭkaristiaj Kongresoj estas internaciaj amaskunvenoj, kiuj ĝenerale okazas en ĉiu dua jaro kaj altiras centmilojn kaj eĉ milionojn da katolikoj. Kompreneble la membroj multe suferas de la malsameco de la lingvoj. Ĝenerale la individuaj kunvenoj, escepte de la ĉefaj ceremonioj, estas organizataj aparte por la diversaj lingvoj. En unu salonego kunvenas la angleparolantoj, en alia lafranceparolantoj, en tria la italeparolantoj, kaj tiel plu. Estas evidente, ke Esperanto povus solvi la problemon. Tial antaŭ dudek jaroj franca pastro proponis, ke oni organizu Esperantistajn Mondkunvenojn en la kadro de la Eŭkaristiaj Kongresoj, por ebligi vere internacian interŝanĝon de ideoj kaj spertoj kaj por samtempe fari efikan propagandon por la internacia lingvo. La Unua Esperantista Eŭkaristia Mondkunveno okazis en Budapeŝto en 1938, la Dua en Barcelono en 1952, la Tria en Rio de Janeiro en 1955.

En Brazilo, kie la Esperanto-movado estas tre vigla kaj kie fiera popolo, kiu amas sian portugalan lingvon, malŝatas la superregadon de la naciaj lingvoj de aliaj, la kondiĉoj estis favoraj. La Esperantista Mondkunveno en la kadro de la Eŭkaristia Kongreso multege helpis la propagandon por nia lingvo, eĉ eksterlande. Miloj da ĵurnaloj (multaj el ili en Usono), centoj da revuoj kaj multaj radio-stacioj priskribis aŭ menciis la Esperanto-aranĝojn en Rio de Janeiro, kiuj ankaŭ estis menciitaj en la oficialaj programlibroj.

La libro kompilita de Pastro Kao enhavas raportojn, dokumentojn kaj fotografaĵojn pri la Eŭkaristia Kongreso kaj la Esperantista Mondkunveno. Ĝi ankaŭ prezentas la kompletan tekston de la prelegoj de 19 eminentuloj el 8 landoj (11 el Brazilo, inter ili unu episkopo, 2 el Usono, po unu el Ĉinujo, Francujo, Italujo, Germanujo, Belgujo kaj Nederlando), kiujn oni laŭtlegis en Esperanto en Rio de Janeiro. Proksimume la duono de la prelegoj estas pri teologiaj kaj religiaj temoj. Kelkaj brazilaj Esperanto-pioniroj, inter ili D-ro Luis de Azeredo Coutinho, D-ro Mário Ritter Nunes kaj F-ino Maria de Lourdes Galvão Cordeiro, donas utilajn konsilojn pri la propagando kaj instruado de Esperanto. Aliflanke longa prelego de D-ro William Solzbacher pri la historio de la katolika Esperanto-movado enhavas malmulte konatajn detalojn pri la unuaj Esperanto-pioniroj. Tiuj detaloj jam altiris la intereson de nekatolikaj kaj katolikaj legantoj.



ESPERANTO KAJ FILATELIO EN KUBO

El *Información*, unu el la kvar plej grandaj ĵurnaloj en Kubo, ni represas du interesajn ilustraĵojn. Supre oni vidas koverton transportitan aerpoŝte de Cienfuegos al La Habana la 24-an de Februaro 1914, kiam la fama kuba aerpioniro Jaime González faris sensacian flugon en Morane-aeroplano. La kovertoj, nun treege valoraj maloftaĵoj, estis eldonitaj kun klarigo presita en lingvoj hispana, angla kaj Esperanto de Andrés María Oliva, bona Esperantisto nun jam delonge mortinta. Kiel oni vidas, ĉi tiu letero estis sendita al D-ro Antonio Alemán Ruiz, kiu nun estas la Sekretario de la Kuba Esperanto-Asocio. Malsupre niaj legantoj vidas bildon de ses poŝtmarkoj eldonitaj honore al Esperanto de la registaroj de Aŭstrujo, Brazilo kaj Bulgarujo. Aliaj registaroj ankaŭ eldonis tiajn poŝtmarkojn aŭ oficialajn poŝtkartojn kun Esperanto-teksto. *Información* publikigas Filatelan Fakon sub la direkto de Ernesto Bello. La 17-an de Februaro 1957 li dediĉis la plej grandan parton al Esperanto, menciante la adreson de la Kuba Esperanto-Asocio kaj esprimante dankon al D-ro Antonio Alemán Ruiz kaj al Antonio González pro ilia kunlaboro.





New books in Esperanto are being published constantly. Our book service handles all titles as soon as they appear. Those who are interested in Esperanto literature, and wish to keep abreast of developments in Esperanto, will find much worthwhile reading in the following new books. Those who may find it inconvenient to make immediate payment may arrange for charge accounts or installment payments. Select your new books and send your order now.

- La Sankta Biblio – Malnova kaj Nova Testamentoj.** A new printing of an old favorite. The Old Testament was translated by Dr. Zamenhof from the Hebrew and later somewhat revised by English scholars. The New Testament was translated by a group of Protestant ministers from the Greek with particular reference to the King James version. 996 pp, printed on excellent paper, well bound in blue cloth, stamped in gold \$ 2.00
 The same as above but printed on india Bible paper, a few at... 2.50
- Ezopa Saĝo,** by K. Kalocsay. A translation in verse of 77 of the most popular and familiar fables of Aesop. Although they treat of animals, each fable points up some moral or teaching which can be applied to human relationships. An introduction presents the life story of Aesop. 127 pp, illust. grey cloth bound 1.40
- Eseoj: Volumo de Beletro,** by G. Waringhien. A collection of 20 original essays by well-known Esperanto author and poet. The subjects are varied and interesting, ranging from prophets of the Bible and Esperanto, to comparative literature, to detective stories and the evolution of the kiss. "Stafeto" series, 232 pp. 1.95
- La Infana Raso,** by William Auld. A collection of 25 original poems in Esperanto by a young Scottish poet. Modernistic in style, expressing the philosophy of life of the author. Illustrated with five abstract paintings by P. Lavalle. "Stafeto" series, 88 pp. 1.95
- Anekdotoj pri Dante,** selected and translated by B. & E. Migliorini. A small booklet of 17 anecdotes about the great Italian poet Dante, author of "The Inferno". 23 pp.15
- Vocabulario Español-Esperanto,** by Dr. Ernesto Tudelo Flores. Recently published in Spain, this dictionary should be well received by all who speak the Spanish language. 20,000 Spanish words are given with 2 or 3 equivalents in Esperanto. Also includes 7 pages of proper names, countries, cities, and personal. 8½" x 5½" in size, 232 pp, bound in maroon cloth 2.45
- Gruk,** by Kumbel (tr. P. Thorsen). Kumbel is the pseudonym of a Danish engineer who writes short humorous epigrams for a Danish newspaper. This Esperanto version presents 67 short verses, each one illustrated with a lively drawing. 72 pp, illust.75

(Members of EANA receive 10% in Book Dividends.)

Esperanto Association of North America, 114 W. 16 St., New York 11, N.Y.

DEZIRAS KORESPONDI

Kosto de anonco: Eksterlande, unu vorto aŭ mallongigo por unu cendo (ses vortoj por 1 int. respondekupono); Elande, unu vorto por du cendoj.

Bulgarujo. S-ro Georgi Janev, str. Dobruĝa 8, *Kjustendil*. Deziras korespondi kun Usonanoj.

Francaujo. S-ro Roger Parrel, Immeuble Berthelot-Gutenberg, *St-Etienne* (Loire). Dez. kor. kun Usonanoj.

Hispanujo. S-ro Juan Sánchez Ros, Apartado 106, *Cartagena*. Juna komencanto en Esperanto, dez. korespondi.

Hungarujo. S-ro Mihály Farkas, *Ormosbánya*. 26-jara instruisto, dez. kor. kun Usonanoj pri lingvoj, filmo, teatro, muziko, ktp.

Japanujo. F-ino Tiekō Isa, 657 Suwa-cho, *Gyoda*, Saitama. 16-jara knabino dez. kor. kun samaĝa knabo, interŝ. il. PK.

Japanujo. F-ino Kiyoko Emori, 302 Yago, *Gyoda*, Saitama, 16-jara knabino dez. kor. kun samaĝa knabo, interŝ. PM kaj il. PK.

Polujo. S-ro Zbigniew Dreczkowski, Nakielska 64/38, *Bydgoszcz*. Dez. kor. pri amatora fotografarto, arkitekturo; ankaŭ dez. interŝ. PM.

American Esperantists will enjoy reading "*The British Esperantist*", official organ of the British Esperanto Association. Published monthly, 20 pages, richly illustrated. Text partly in Esperanto, partly in English. Subscription for one year \$1.50; order through EANA. Free specimen copy obtainable from the British Esperanto Association, 140 Holland Park Ave., London W. 11, England.

La Filatelisto, Bulteno por kolektantoj kaj korespondemuloj. Aperas ĉiun duan monaton, enhavas dekojn da adresoj de korespondemuloj el la tuta mondo. Ĉiu abonanto de "*La Filatelisto*" rajtas publikigi en ĝi senpage sian anoncon. Abonebla pere de EANA, jarabono nur 85¢. Sendu 3-cendan poŝtmarkon por provekzemplero.

Kristana Esperantista Ligo Internacia kunligas kristanojn diversekleziajn kaj diverslandajn. Ĝiaj membroj estas ĉefe en Europo, sed ĝi havas novan kaj kreskantan usonan sekcion, kiu eldonas monatan gazeton en Esperanto. Por senpage provekzemplero kaj informoj, sendu poŝtkarton al *R. W. Powell, 2223 35th St., Astoria 5, N. Y.*

INTRODUCTION TO ESPERANTO

The Universal Language
3rd Edition - Price \$2.00



Sent on five days
examination FREE.

Box 792, Placerville, Calif.

ESPERANTO-INSIGNOJ



No. 7



No. 6



No. 11



Pendant



Tie-pin



No. 2

Button or Brooch 50¢ — Pendant 60¢

Order from EANA.

THE CONNOR COURSE IN ESPERANTO

Correspondence Course with Vinylite Records
Instruction by Doris Tappan Connor

The "*Connor Course*" is unique, — it provides real-life disk conversations plus personal instruction. You *converse* with the disk and *confer* with the instructor. Compiled by experts.

The complete "*Connor Course*" includes the following:

- (1) A lively text, "*Esperanto: The World Interlanguage.*"
- (2) Eight "*Vinylite*" double-sided 10 records, 78 r.p.m.
- (3) A practical and easy-to-follow "*Study Guide*" (82 pp.)
- (4) Personalized instruction and guidance of *Mrs. Connor.*
- (5) Supply of answer paper and printed return envelopes.
- (6) An interesting card game, to develop your vocabulary.
- (7) And finally, an official "*Certificate of Achievement*".

FOR INDIVIDUAL STUDY: The complete "*Connor Course*", as described above, will be sent postpaid for *only \$36.*

FOR GROUP STUDY: Buy one complete *master course* at \$36. Each additional member pays *only \$6 more* for Textbook and complete *Study Guide* for his own use.

Full money-back guarantee. So, place your order *NOW:*

LINGUAPHONE HOME STUDY COURSES

You can learn *ESPERANTO*, or any other language listed below, by the world-renowned *Linguaphone* Ear-Eye Method. Order through the *Esperanto Book Service* for benefits to both yourself and your *Esperanto* Central Office. You may select:

Esperanto	Russian	Swedish	Persian
Italian	Finnish	Hebrew	Hausa
Irish	Arabic	Bengali	Spanish
Polish	Japanese	Greek	Dutch
Chinese	Latin	German	Afrikaans
Malay	French	Czech	Hindustani
English	Portuguese	Norwegian	Effik

Regular list price for *Esperanto*, complete course, is \$57.50. Most other languages are priced the same. A few higher, a few lower — dependent upon number of records and other factors. Write to *Esperanto Book Service* about any language in which you are interested. Special payments for members of EANA.

Esperanto Book Service, 114 W. 16 St., New York 11, N. Y.